


La 20an de aŭgusto 2015

Kio okazas post la nuklea akcidento?

Multaj landoj havas nukleajn centralojn. Kio okazos al la loĝantoj, kiam okazos gravaj nukleaj akcidentoj. Vi povas klare vidi kaj kompreni, kio okazos al la loĝantoj, nome al vi, se vi vidas faktojn okazantajn en Fukuŝima. Japanio estas moderna kaj ŝajne demokratia lando, kie homaj rajtoj estas ŝajne protektataj, kaj la registaro havas pli grandan buĝeton por tiu katastrofo, ol en aliaj landoj. Kio okazas en tiu “bona” lando?

Urboj povos malaperi

La registaro publikigis prognozon pri la estonta loĝantaro en la 12 urboj laŭ la marborda regiono de Fukuŝima, kies loĝantoj estas ordonitaj fuĝi el la urboj :



En tiuj urboj loĝis 203000 homoj antaŭ la nuklea akcidento, kaj laŭ la prognozo en 2008, la loĝantaro ŝrumpas al 135000 en 2045, ĉar la japana loĝantaro ĝenerale pli kaj pli malmultiĝas. Sed pro la nuklea akcidento la loĝantaro pli rapide ŝrumpas al 102000 en 2045. Laŭ mia opinio, tiu prognozo estas tro optimisma. Ĉar nur maljunuloj revenos al sia urbo, la loĝantaro pli rapide malgrandiĝos, sekve tiuj urboj baldaŭ malaperos.


Enketo inter la urbanoj ĉirkaŭ la nuklea centralo en aŭgusto-oktobro 2014 montras, ke nur malmultaj volas reveni al sia eksa urbo:

Kiom da homoj volas reveni al sia hejmo

Urboj	Revenos
Namie	16,6%
Futaba	12,3%
Ookuma	13,3%
Tomioka	11,9%

La urboj fariĝos sanktejoj por aproj

Anstataŭ homoj ekloĝas bestoj, precipe aproj en tiuj urboj.



↑ Okazis la akcidento en 2011


Antaŭe ĉasistoj povis vendi apro-viandon, sed nun la viando estas pli poluita ol la normo kaj ne manĝebla, do ili ne volas ĉasi, kaj krome oni devas enterigi aŭ bruligi kaptitajn aprojn. Ankaŭ tio estas ne facila.

Hibridoj de apro (*inoŝiŝi*) kaj porko (*buta*) nomataj “*ino-buta*” multiĝas. Ili pli ofte kaj pli multe naskas bebojn, do okazas pli da problemoj.



Ankaŭ la najbaraj gubernioj suferas

Radioaktivaĵoj disflugis el la difektitaj reaktoroj trans la limoj de Fukuŝima kaj poluis vastan areon.



4. Mijagi
7. Fukuŝima
8. Ibaraki
9. Toĉigi
10. Gunma (kie mi loĝas)
12. Ĉiba
13. Tokio

Kvin gubernioj ĉirkaŭ Fukuŝima: Mijagi, Ibaraki, Toĉigi, Gunma kaj Ĉiba, konservas jene poluitaĵojn:

Gubernioj	Kvanto	Konservejoj	Situacio
Fukuŝima	133946 tunoj	Ne publikigita	Transportos al la konservejo en Tomioka
Mijagi	3404	38 lokoj en 9 urboj	Nomumitaj tri urboj rifuzis.
Ibaraki	3531	15 lokoj en 14 urboj	Ne ekzistas konkreta plano
Gunma	1186	9 lokoj en 7 urboj	Ne ekzistas konkreta plano
Toĉigi	13533	161 lokoj en 11 urboj	Nomumita urbo rifuzis
Ĉiba	3690	18 lokoj en 10 urboj	Nomumita urbo Ĉiba forte rifuzas


Pri Ĉiba, la ministerio pri medio proponis, ke la fina conservejo estu en la tereno de la vaporenergia centralo de TEPCO, kaj tiu akceptis la planon, sed la loĝantoj forte protestis, kaj la plano stagnas. La ministerio ruze ŝanĝis la nomon de “Fina conservejo” al “Longeadministrotita instalaĵo” por trompi la loĝantojn, sed kompreneble ĝi ne sukcesis konvinki ilin.

En julio 2015 7128 homoj en la gubernio Toĉigi situanta sude de Fukuŝima postulis kompensan monon al TEPCO. Kvankam ili suferis pro la akcidento same kiel la fukuŝima-anoj, TEPCO nenion faris al ili, nek pardonpetis de ili.

Suferantoj estas forĵetitaj

Nun en la urboj Namie, Futaba, Ookuma, Tomioka kaj Naraha laŭ la marbordo de Fukuŝima (vidu la mapon en la sekva paĝo) neniuj loĝas. Laŭ la ordono de la registaro ĉiuj loĝantoj rifuĝis kaj dum pli ol 4 jaroj loĝas en fremdaj lokoj, ricevante nesufiĉan kompensan monon.

En marto la registaro publikigis novan planon pri la nuligo de tiu ordono pri rifuĝo. Laŭ tiu plano, krom tro dense poluitaj urboj, la aliaj fariĝos “loĝeblaj” ĝis marto 2017, nome malpli poluitaj ol 20 milisivertoj jare, do TEPCO kaj la registaro ĉesos pagi kompensan monon en marto 2018 kaj pli poste ne plu. Sed tiu cifero 20 estas tro granda. Laŭ la leĝo kaj ĝis antaŭ la akcidento la loko pli poluita ol 1 milisiverto/jare ne estis loĝebla. Por ŝpari kompensan monon, la registaro kaj TEPCO provas revenigi la loĝantojn, trudante tiun nelogikan ciferon al ili.



En la komenco de septembro la registaro deklaras la nuligon de tiu ordono al la urboj de Naraha. 7300 loĝantoj, ankoraŭ ne havante sufiĉan rimedon por vivteni sin, perdis kompensan monon. 90% el ili ne volas reveni pro timo al forta radioaktiveco kaj pro vivmaloportunoj; sen hospitaloj kaj butikoj, sen najbaroj. Ili povos perdi ankaŭ loĝejon, ĉar la

registaro ĉesos doni senpagan provizoran loĝejon al ili en marto 2017. Ili plu devas ŝvebi maltrankvile kaj malstabile ie en la japana socio.

Konkludo

Nuklea akcidento estas tute malsama ol aliaj akcidentoj. Radioaktiveco vaste disflugas kaj ne malaperas, do la akcidento daŭros longege. Eĉ se nukleaj reaktoroj ne troviĝas najbare de via domo, iam ajn vi povos fariĝi viktimoj de la akcidento.

La registaro kaj la elektraj kompanioj agadas kapitalisme, nome nur por profito, do ili volas plej frue ĉesi zorgi pri la suferantoj. Bedaŭrinde monavidaj homoj subaĉetitaj de grandaj entreprenoj regas la landon, do ĉiam honestaj sed malfortaj homoj devas suferadi. Tion klare montras la nuna situacio de la suferantoj de la nuklea akcidento de Fukuŝima.